

Justinus Kerner,

La plej riĉa princo

tradukita de Manfred Retzlaff

Siajn landojn laŭdegante

|:De l' princaro konsili':²|

|:Sidis iam en la halo:|

|:De l' germana imperi':.|

“Ja belegas mia lando,”

|:Jen la princo de Saksi':.|

|:“Multe da arĝenta erco:|

|:En la montoj havas mi.”:|

“Belas ankaŭ mia lando”,

|:La Rejn-princo gloras sin.:|

|:“Ora greno en la valoj,:|

|:Sur la montoj nobla vin”.:|

La sinjor' de Bavario

|:Diris: “Riĉas ankaŭ mi.:|

|:Laŭ trezoroj estas riĉa:|

|:Mia lando ne malpli.”:|

Eberhardo, la barbulo,

|:Virtemberga la sinjor',:|

|:Diris: “Ja en mia lando:|

|:Estas nek arĝent' nek or'.:|

Sed ĝi tamen estas riĉa,

|:Trezoregon havas ĝi::|

|:Ke al subularo mia:|

|:Ja konfidi povas mi.”:|

Diris la sinjor' Saksia,

|:De l' Rejnland', de Bavari':|

|:“Vi barbula graf', plej riĉa:|

|:El ni ĉiuj estas vi!”:|

...

²aŭ:

|:La princara konsili':|

*Traduko de la Germana poemo "Der reichste Fürst" de JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-929-1864 (2013-10-09 18:59:42)

La poemo estas kantebla la jena melodio: http://www.politikundunterricht.de/2_3_01/M_hymnen.htm#fuerst. Tie ĝi estas ankaŭ aŭdebla. Ĝi estas la Virtemberga himno. La muzikntoj troviĝas ankaŭ en <http://www.volksliederarchiv.de/notenpdfs/1999.pdf>.